

Claude Gacond intervjuas s-ro Giorgio Silfer pri Internacia Feria Altlernejo (IFA)

SRI-1977-11-B-6-84

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1977-11/SRI-1977-11-B-6-84-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-s-ro-Giorgio-Silfer-pri-IFA.mp3>

CG.- Parolas Claude Gacond. Hodiaŭ mi havas la honoron komenci serion da intervjuoj kun s-ro Giorgio Silfer pri IFA ni parolos. IFA, tio estas mallongigo por Internacia Feria Altlernejo, kiu stariĝas iom post iom en la urbo La Chaux-de-Fonds. S-ro Giorgio Silfer, ion vi opinias pri IFA nuntempe ?

GS.- Mi diru tiel, ke mi vidas la aferon en rekta rilato kun Kultura Centro Esperantista. Nome, por ke ekzistu kultura centro, ne sufiĉas nomi ĝin tia. Estas absolute necese por ke ĝi ludu tiun rolon de centro kiu altiras la homojn, la intelektulojn de esperantujo, estas absolute necese, ke tie ekzistu ankaŭ iu lerneja agado. Lerneje ne necese en la tradicia signifo, IFA povus esti tutsimple la rezulto de konstanta, daŭra, mi diru didaktika aktivado. Tiu didaktika aktivado, kiu povas konkretiĝi pere de seminarioj, de kulturaj semajnfinoj, de staĝoj, tiamaniere, ke ni havas ian konstelacion de pluraj aranĝoj, kiuj en difinita momento de la jaro, specife dum la feria epoko, fakte temas pri feraia altlernejo, povas doni didaktikan kontinuecon kaj kulturen fonon por ĝuste akceli la valoron de tiu rolo de kultura centro en esperantujo.

CG.- Ni rimarkas, ke ni estas nun pretaj eliri la pioniran eksperimentan fazon de la IFA-aktiveco profite al planado de kurs-sesioj, kiujn ni intencas organizi kun la helpo de fakaj organizaĵoj. Ekzemple por la literaturaj kursoj ni povos kalkuli je la kunlaboro de Literatura Foiro, kies ĉefredaktoro ĝuste estas s-ro Giorgio Silfer, ĉu ne ?

GS.- Nu, nature, nature. Mi diru ke mi vidas en la afero tri nivelojn. Nome povas esti kursoj por komencantoj, kursoj por progresantoj kaj kursoj por homoj, kiuj jam regas Esperanton. Estas evidente ke estas multe pli facile trovi merkaton de ne-esperantistoj, ĉar ili estas plimultnombraj ol la esperantistoj. Kaj aliflanke tiu merkato estas ankaŭ pli facile atingebla laŭ geografia vidpunkto, ĉar plej facile oni povas trovi ne-esperantistojn en Svislando mem. Male, en tiu tria grado, tiu de la homoj, kiuj jam bone regas la lingvon, ni havus samtempe la plej internacian karakteron. Ĉi tie Literatura Foiro estas preta helpi. Literatura Foiro, kiel internacia kultura revuo havas propran legantaron, kiu estas fakte internacia kaj pro tio estas pli facile atingebla kaj konkerebla al la intereso de IFA. Ĉi-jare, ekzemple, ni povas lanĉi en la monato aŭgusto iun kurson, semajnan kurson, pri la temo 'Enkonduko al literatura kritiko'. Temos pri kurso ankaŭ por profanoj, kompreneble, faka lingvo sed alirebla al kiu ajn, kiu per Esperanto volas ne konsili, *kion legi*, sed doni metodikon pri *kiel legi*. Mi diru ke ĝenerale ni devos analizi laŭ estetika kaj laŭ poetika vidpunkto beletrajn verkojn, unuavice en rilato kun la Esperanto-literaturo, kiu pli proksimen karesas nin, sed aliflanke ankaŭ donante ĝeneralan bazon, kiu povas helpi por alfronti legadon de nacilingva literaturo. Kaj tie ĉi fakte mi vidas la duvalentan funkcion de IFA. Unuflanke ĝi helpas por profundigi la esperantologian preparon de la partoprenanto, sed aliflanke ĝi donas ion konkrete valoran por pliriĉigi la kulturon, por pliriĉigi la klernivelon de la partoprenanto, sendepende de la fakto, ĉu li estas strikte ligita al esperantologiaj interesoj aŭ ne.

CG.- Post tiuj ĉi respondoj de s-ro Giorgio Silfer, vi eksentas ke Literatura Foiro estos alvokata ludi grandan rolon en la disvolviĝo de IFA, tio estas Internacia Feria Altlernejo, kies kursoj okazos en La Chaux-de-Fonds. Kiel vi aŭdis, la venonta kurso estos ĝuste gvidata de s-

ro Giorgio Silfer. Kaj pritraktos enkondukon al literatura kritiko. Ĝi okazos de la 21-a ĝis la 27-a de aŭgusto. Interesatoj petu la detalan programon tra la kanalo de Literatura Foiro mem, aŭ de nia kurtonda radio. En la venonta semajno mi intervjuos s-ron Giorgio Silfer ĝuste pri la internacia kultura revuo, Literatura Foiro.

Vi aŭdis intervjuon el Svislando. Parolis Claude Gacond kun Giorgio Silfer. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2013*